# & Eta kaŭzo – granda efiko!:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 175 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino".>

**(#Melodio:**

<:35 > (a;La /LaLa doLa Tido reeTi;Ti rere doTi Lado LaaLa;La LaLa doLa Tido reTi; re doTi Lado LaLa

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La La;)

)×5 )+

**(&Strofoj:**

'1 La /sciencistoj certe pravas ; Dirante, ke, samkiel homoj, ; La floroj, fruktoj kaj legomoj ; Malsamajn seksojn havas.

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto**.)

'2 De bela arbo, postsomere, ; Defalis piro kaj surtere ; Renkontis sian amatinon, ; Ruĝvangan la pir-inon... .....

'3 Li pri soleco ŝin konsolis ; Kaj varmiĝinte ekpetolis, ; Kaj amindumis la gepiroj ; Samkiel la geviroj! .....

'4 En densa ombro de l' herbaro ; Geamis sin la pira paro... ; Ŝi naskis idon, kun doloroj, ; Laŭdeve post naŭ horoj; .....

'5 Kaj ĉiuj piroj kun aklamo ; Bruegis je ĉi tiu vido, ; Ĉar estis ido de l' piramo ; Ververa... Piramido! .....)